

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Nalla Sadretlnova
[Voroneĵ, Rusio]

2001

Kristnaska fabelo — kiel eksprezidanto de UEA Humphrey Tonkin iĝis esperantisto — literatur-historiaj paĝoj — poetike — amuza gramatiko — gratulojn al Bill Thorne — aforismoj — anekdotoj — enigmoj — rezultoj 2001 — anoncetoj — korespondu!

8

Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton:

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG.

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĝka 1, CZ-696 62 Strŝznice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzter, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Venis vintro en la nordan hemisferon, kaj la lastan kajeron de "K"-2001 maikovras novjara bildo de Sadretĉinova Naila el Rusio kaj kristnaska fabelo, sendita al ni el Francio de Martin Ginette.

Vere atentokapta kaj aventureca estas historio de Humphrey Tonkin pri lia esperantistiĝo. Sur sekvaj paĝoj vi tradicie trovos literatur-historian rubrikon; plue vin plezurigos originalaj filozofiemaj poemoj de niaj legantoj el Brazilo, Svedio kaj Italio, akompanataj de belaj bildoj. Ekde tiu ĉi numero ni lanĉas ankaŭ novan rubrikon "Gramatiko serioze kaj amuze".

Ni gratulas nian patriarkon Bill Thorne el Britio okaze de lia naskiĝdato. Li mem afable sendis al ni sian ŝercan foton.

Sur siaj kutimaj lokoj vi trovos tradiciajn anekdotojn, aforismojn, enigmojn, anoncetojn, ilustritajn per spritaj bildoj de niaj aŭtoroj.

Agrablan legadon!

Restu kun ni en 2002!

DANKON al s-ino *Martin Ginette*
pro 200 frankoj donace al "K"

KOMENCANTO

2001 numero 8 // 8 numeroj jare (2002 - 6)
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto: let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA. vkud-a

ruslanda tarifo: 120 ruslandaj rubloj (por 6 numeroj jare) poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, Екатеринбург,
620041, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menciigi KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Fabelo de franca aŭtoro **Yves Simon**
Esperantigis **Martin Ginette**,
[Saulxures/Moselotte, Francio]

Kristnaska fabelo

LA UNUA PAŜO

"Luno estas kaŝemulo. Ĝi certe kaŝas ion ĉar ĝia vizaĝo estas kaŝita por ni ekde la pratempoj", — diris sinjorino Samuelo, vendistino de cigaroj el Kubo. Kaj ŝi pludiris: "Oni neniam devas fari promeson dum plenluma nokto".

Kio ne estis findirita pri tiu beleta malgranda satelito? Kun ĝia maro de trankvileco, de fekundeco, kaj ankaŭ ĝia lago de travidebleco? Eble ĝi iam estos invadata per paneloj kun likvaj kristaloj, reklamantaj la lastan kvar-stelan hotelon "Ĉe la Tero-rebrilo" kun ĝia naĝejo, plenigita per kolorada akvo, ĝiaj ĉambroj kun vekig'obleco rigarde al Pacifiko kaj matenmanĝo super Amazonio.

"Luno mensogas, kaŝas, friponas, — ili diras.

— Kiu?

— La plenkreskuloj ... Estas la homoj, kiuj mensogas, ĉar ili forgesis sian infanaĝon."

"Sufiĉas!" — pensas Sebastian, juna ĵurnalisto, ĵus skribinta longan artikolon pri la tridek jaroj de kosmo-konkerado kaj pri la unua paŝo de la homo sur la lunon.

Li sukcesis interkonsenti pri rendezuo vid'al-vide kun Neil Armstrong, ĉe lia bieno, en Nova Meksikio.

"Mi akceptas vin ĉe mi, ĉar vi diris al mi, dum peto por intervjuo, ke vi naskiĝis la tagon, dum kiu, por la unua fojo, objekto, fabrikita de homoj, alokiĝis sur grundon, kiu ne estas Tero, la 21-an de julio 1969.

Mi vidis signon. Fine, kio igas nin agi aŭ ne agi? Detaloj... Kio igas nin akcepti taskojn aŭ ne? Detaloj... Ĉu vi scias, ke 13410 personoj naskiĝis sur la Tero, kiel vi, tiun tagon. La detalo koncerne vin estas sur la proporcio-skalo, kiel unu kontraŭ 13000. Nu, ni revenu al nia diskuto.

Oni demandis min, centojn da fojoj, pri kio mi pensis antaŭ ol meti piedon sur la lunan grundon. Depende de tagoj kaj humoro mi

respondis: "Pri mia patrino", "Pri Ameriko". Unufoje mi diris: "Pri prezidento Nikson!"

... "Fakte mi estis ŝtonmirigata retrovi sur la luno infanan sonĝon, kiun mi devigis min forgesi. Imagu! Temas pri kompleta neeblaĵo, miraklo, el tiuj, kiujn infanoj kutime konas, sed kiujn la plenkreskuloj severe punas kun glacia fi-rigardo."

Armstrong rapide iris kaj revenis al la kaĝo de kolibroj pendanta fronte al tropika ĝardeno, vira domo kun raraj arboj, mang-arboj, banan-arboj, ebon-arboj kaj nanaj heve-arboj. Tiam li denove sidiĝis post ekflamigo de etmodela cigaro. "Aŭskultu kion mi rakontos al vi... Sed haltigu, mi petas, vian registrilon de sekretoj. Se vi skribos unu linion de miaj prononcotaj vortoj, mi nepre neos la tuton, mi diros, ke vi perfidis, trompis min, kaj mi sendos al vi miajn advokatojn, du irlandanojn, kruelajn kiel hundaĉoj."

Kontraŭkore, la juna ĵurnalisto malŝaltis la klavaron de la magnetofono kaj koncentris sin por memori ĉiun vorton de la sekvonta konversacio.

"Mi aĝis sep jarojn, kaj, je kristnaska tago, mia patrino donacis al mi malgrandan teleskopon kaj sporto-ŝuojn, el la firmao "Venture", kiuj estis modaj en tiu epoko; kaj, kiel la hodiaŭaj firmaoj, ili tiom fieris pri sia emblemo (V kun tri steloj ene), ke ili presis ĝin sur la flankojn, kaj skulptis ĝin sur la kaŭĉukon de la plandumo.

Tiun vesperon, mi enlitiĝis tre frue por profiti miajn donacojn, kaj post vana provo lokigi pecon de ĉielo en mian teleskopon, mi ekdormis kun la ŝuoj surpiede.


Mi estis la eta princo. Mi parolis al neniu pri mia sonĝo, kaj la vivo daŭris.

Aktuale, mi revenas al la 21-a de junio 1969. Ĉe la fama momento, kiun televido faris eterne memorinda, en tiu momento kiam

mi estis apoginta mian piedon sur la lunon, ĉu vi scias, kio altiris mian atenton? Kio ŝtonigis min, emociigis min, mirigis min, entenis min en mondon, kiun mi krèdis forgesita kaj perdita? Ne mia patrino, ne Ameriko, kaj certe ne Nikson, sed... malgranda spuro sur la luna grundo, spuro de infana piedo. Kaj ne iu ajn piedo de infano! — kio en si mem estis eksterordinara — sed spuro de sportaj ŝuoj kun "V" kaj tri steloj ene. Mian veran kaj aŭtentikan paŝon sur la luno, ĝuste tiun el mia sonĝo, mi vidis je la elŝipiĝo.

— Kion vi diros pri tio? Kio estas la plej strangege? Ĉu la potenco de la infanaj sonĝoj aŭ tiu de la plej pinta kosmo-tekniko?"

Armstrong leviĝis kaj alproksimiĝis la kaĝon, kie la du kolibroj petolis. "Luno estas kaŝemulo, certe, sed ĝia kaŝata flanko estas nur ŝirmo por altiri scivolemon de la plenkreskuloj. Ĝi lasas ilin diri kaj misdiri, ĝi ne volus perfidi la infanojn, kun kiuj ĝi traktadas ĉiun nokton. Prefere dum kristnaskaj tagoj.



Vinnikova Nina, [N. Altajsk, Rusio]

Kiel tio komenciĝis

Humphrey Tonkin

eksprezidanto de UEA, nuna vicprezidanto de Universala Esperanto Asocio

... mi estis hokita al Esperanto kiel fiŝo al fadeno!



Humphrey Tonkin (1939) brito. Eksprezidanto de UEA, membro de ĝia Honora Patrona Komitato. Akademiano. Prezidanto de la Universitato de Hartford, Usono; profesoro pri humanaj studoj. Eksprofesoro en Pensilvanio kaj Columbia. Multe verkis angle (angla literaturo, internaciaj studoj), Esperante (lingvo, literaturo, movado) kaj tradukis.

La jaro estis 1954. La lando estis Britio. En mia lernejo, estis instruistoj pri kvar fremdaj lingvoj — la franca, la latina, la greka kaj la germana. Ĉiu homo devis dum difinita periodo studi la latinan kaj la francan, sed oni rajtis (se oni povas aranĝi sian studprogramon) studi ankaŭ la grekan aŭ la germanan. Ĉar plaĉis al mi la studado de lingvoj, mi elektis studi la germanan.

La germana kaj mi estis kiel oleo kaj akvo: ni ne miksiĝis.

Malsaĝa paŝo! La germana kaj mi estis kiel oleo kaj akvo: ni ne miksiĝis. Mi ne scias, kiel mi tiel malbone progresis pri la germana (mi ja bone lernadis ekzemple la francan), sed tiel estis. En tiu tempo, kiel juna kaj

iom aroga lerneĵano, mi kulpigis la instruiston (kiu ja estis iom teda) kaj la tute eksmodan lernolibron, kiu ekzemple prezentis la germanan ĉefurbon kvazaŭ la dua mondmilito tute ne okazis. Vere, la libro estis verkita jam antaŭ la milito: oni simple daŭre reprenis ĝin, kvazaŭ la rusoj, britoj, francoj kaj usonanoj neniam eĉ metis siajn soldatajn botojn sur la Berlinajn bulvarojn.

Sed aldone al la mankoj de la instruisto kaj de la lernolibro, estis plia manko, kiun mi tiutempe ne rekonis: tiu manko estis mi mem. De la komenco, pro Dio scias kiu motivo, mi rifuzis trakti tiun lingvon serioze. Mi ne studis la verbojn, ne lernis kiel manipuli la (cetere komplikajn!) adjektivojn kaj substantivojn, ne legis la asignitajn tekstojn en mia legolibro. Mi ja lernis reciti kelkajn germanajn poemojn, kiuj sonis tute ĉarme eĉ se mi ne povis kompreni ilin: mi ankoraŭ povas citi diversajn apenaŭ kompreneblajn (de mi!) poemojn de Heine. Ĉefe, tamen, mi babilis kun miaj amikoj dum la lernohoroj, malgraŭ la oftaj admonoj de la instruisto.

Fine la instruisto perdis la paciencon: "Mi... certas, ke vi neniam lernos lingvojn."

Fine, la instruisto perdis la paciencon: "Tonkin, iru al la biblioteko kaj restu tie dum miaj lecionoj. Mi ne plu pretas toleri vian impertinenton. Mi ankaŭ certas, ke vi neniam lernos lingvojn." Kaj mi iris. Mi iris, kompreneble, sen ajna kredo, ke estas mi, kiu misagas: kun la serena certeco de junulo, mi estis konvinkita, ke la netoleremo de la instruisto estis la sola kaŭzo de lia insisto forigi min. Senhonta kaj senpenta, mi estis tamen iomete vundita de lia ri-

marko pri mia ŝajna nekapablo lerni lingvojn...

Mi ja frontis malfacilan situacion. Je la fino de la jaro mi devos partopreni nacian ekzamenon pri la germana: per tiu forpuŝo la instruisto kvazaŭ garantiis mian malsukceson en tiu ekzameno. Kion fari? Mi venis al du decidoj. Unue, se la instruisto estas tiel nekompetenta, mi instruos la germanan al mi mem, kaj sukcesos en la ekzameno. Por kio tia instruisto? Prefere la lernejestro simple maldungu lin!

Due, por prui al tiu (laŭ mi) nekompetentulo, ke mi ne estas kompleta stultulo pri lingvoj, mi lernos plian lingvon, tie dum miaj nun liberaj horoj en la biblioteko.

Sed mi estis prudenta. Se mi lernos plian lingvon, mi tamen lernu facilan lingvon. Prefere ĝi estu lingvo, kiu ne estas malfacile elparolebla kaj kies gramatikaj reguloj estas ne tro komplikaj. Ankaŭ gravas, ke estu libroj pri tiu lingvo en nia biblioteko.

Tiel mi trovis Esperanton. Aŭ, pli precize, mi trovis lernolibron de Esperanto sur la biblioteka bretaro kaj mi hazarde trovis en iu gazeto, kiun mi trafolumis, anoncon pri koresponda kurso de la Brita Esperanto-Asocio. Mi tuj skribis al la Londona adreso kaj enskribis min.

Komprenu bone mian situacion. Mi estis knabo kun iom mallarĝaj horizontoj, el provinca urbeto de Britio, en periodo post granda mondmilito. Mi sciis malmulton pri la mondo. Neniam mi vojaĝis eksterlanden, kaj ankaŭ mia familio neniam multe vojaĝis. Mi lernis en la lernejo pri la granda mondo, kvankam kiel skeptika knabo mi ne ĉiam kredis tion,

kion diris al mi miaj instruistoj. Fakte mi volis mem sperti tiun mondon. Simpla deziro, tamen nur komplike plenumbla! Eble Esperanto estus tiu fenestro al la mondo, kiun mi serĉis.

La poŝto alportis ne unu-du leterojn... sed dekojn. Entute kvindek du respondojn.

Komencis veni la poŝtaj lecionoj. La kurso uzis ne tre imponan lernolibron el Svedio, sed almenaŭ ĝi ne traktis la vortprovizon por trinkado de teo ĉe la ĉefbulvaroj de Berlino! Mi rapide lernis. Baldaŭ mi decidis membriĝi al Brita Esperanto-Asocio, kiu sendis al mi ne nur sian revuon, sed ankaŭ ekzempleron de *Heroldo de Esperanto*. *Heroldo* tiutempe havis tutan rubrikon por homoj, kiuj volis korespondi en Esperanto kun alilandanoj. Mi respondis al kelkaj tiuj anoncoj kaj ricevis kelkajn leterojn responde. Sed mi ankaŭ decidis, ke mi mem metos anoncon tien. Mi amasigis miajn iom limigitajn monerojn kaj sendis al *Heroldo* anoncon.

Kelkajn semajnojn poste, la anonceto aperis. Imagu mian surprizon kaj ĝojon kiam en la postaj semajnoj la poŝto alportis ne unu-du leterojn (kiel mi ja atendis), sed dekojn. Ili venis el plej diversaj partoj de la mondo: el Japanio, el Brazilo, el Maroko, kaj el amaso da eŭropaj landoj. Entute kvindek du respondojn. Normala persono elektis la personojn, al kiuj respondi, sed mi decidis respondi al ĉiuj kvindek du homoj — kaj sidis ĉe mia skribotablo por komenci la laboron.

Tiu epoko estis longe antaŭ la tempo de komputiloj: eĉ se mi diris al ĉiuj kvindek du homoj esence la samajn aferojn pri mi mem, mi devis skribi ĉiun leteron aparte. Teda laboro, sed tre efika por la lingvolernado, ĉar la ripetado fiksas la vortojn en mian kapon. La leteroj multiĝis, kaj multiĝis la horoj, dum kiuj mi diligente skribis kaj la temojn, kiujn mi tuŝis. La postan Kristnaskon, mia patrino

donacis al mi portebian skribmaŝinon — kio faciligis mian nun preskaŭ manian leterskribadon. La leterskribado, siavice, rapide instruis al mi kiel bone tajpi...

Se la bona tajpado estis la unua instruo, kiu venis al mi per Esperanto, mi baldaŭ lernis multajn aliajn lecionojn. Miaj diversaj korespondantoj (kelkaj estis pli fidelaj ol aliaj) skribis al mi pri sia ĉiutaga vivo, pri la propraj landoj, pri siaj lernejoj kaj siaj profesioj. Ĉion ĉi mi notis kaj enkapgigis.

Kiam en la lernejo venis la tempo de prijuĝo de la lerneja premio pri ĝenerala scio, mi gajnis la premion en la ekzameno senprobleme. Mi komencis prelegi al miaj propraj instruistoj (mi ja estis aroganta knabo!) pri geografio kaj ekonomiko eĉ de ili nekonata.

Malgraŭ la korespondado, kaj malgraŭ la fakto, ke mia scio de Esperanto kreskis de tago al tago, mi estis iel nekonvinkita, ke Esperanto povas vere funkcii por konversaciado. Kiel la homoj povus vere esprimi sin flue kaj facile per lingvo konstruita, farita arte? La postan printempon mi estis invitita de mia onklo kaj onklino akompani ilin al Parizo — mia unua eksterlanda vojaĝo. Ili supozis, ke mi plibonigos mian francan lingvon per tio, sed mi havis aliajn inten-


cojn. Tuj je alveno mi kontaktis la lokajn esperantistojn, kaj du tagojn poste mi ĉeestis mian unuan Esperanto-kunvenon kaj havis mian unuan Esperanto-konversacion.

La kunveno estis iom teda por juna knabo — kaj la posta konversacio, kun kelkaj tre marksistaj francaj studentoj — estis ankaŭ iom ekster mia norala interesosfero. Tamen, mi komprenis ĉiujn vortojn de tiu ĉi al mi nova lingvo — kaj mi estis hokita al Esperanto kiel fiŝo al fadeno!

Jen, do, la rakonto pri mia vivo kiel komencanto. Venis poste multaj aventuroj — Universalaj Kongresoj de Esperanto, junularaj kongresoj, eĉ vojaĝo ĉirkaŭ la terglobo. Sed ĉio ĉi okazis kiam mi ĉesis esti komencanto kaj iĝis plena kaj kompleta parolanto kaj uzanto de la lingvo Esperanto.

Kaj pri la germana? Nu, je mia konsiderinda fiero mi sukcesis en mia ekzameno pri la germana lingvo. Per unu poento nur... sed, kiel mi klarigis al miaj amikoj, venko estas venko. Kaj tiu ne estis sola venko: mi ankaŭ gajnis Esperanton, kaj per tio tutan mondon...

Manfred Jankin



La 2-a periodo de esperanta literaturo

*Verkistoj de
originala E-prozo*

Nia ĉi-numera rakonto estas pri du verkistoj, kiuj plejparte kreis siajn ĉefajn verkojn ankaŭ dum la jaroj de la dua literatur-historia periodo. Kvankam la aŭtoroj estis reprezentantoj de diversaj landoj kaj literaturaj esprimmanieroj, ilin kunigas tute sindonema movada kaj literatura agado en Esperanto, kaj tio, ke ambaŭ famiĝis kiel aŭtoroj de originalaj E-romanoj. La unua aŭtotro estas nederlanda verkisto Hindrik Jan Bulthuis.

Hindrik Jan Bulthuis

nederlandano, doganoficisto. Naskiĝis 15 sept. 1865 en Warfŭm, Groningen.

Dum junaĝo li estis Volapukisto, sed en 1901 lernis Esperanton kaj poste iĝis unu el la plej persistaj laborantoj en la esperanta kampo: aktive okupiĝis pri internacia korespondado, multe propagandis Esperanton, precipe en Haag, gvidis E-kursojn, funkciis kiel sekretario de Esperanta ekzamena komitato.

Ankaŭ literatura agado de H. Bulthuis estis tre multflanka: li multe tradukis el la nederlanda, dana, flandra, norvega kaj angla lingvoj; verkis originalajn romanojn kaj leĝlernolibrojn por infanoj.

Lia unua presita verkaĵo aperis en la literatura aldono de revuo "Lingvo Internacia" ankoraŭ en 1905 — tio estis komedio, tradukita el la angla "Neniam estas pli bone ol malfrue". En 1907 aperis lia "Du biletoj" — traduko el la franca de Florian. Poste sekvis "Salome" de Oskar Wilde (1910), "La Leono de Flandrujo" (1929) el la flandra de Conscience, "Imperiestro kaj Galileano" (1930) el la norvega de Ibsen. Du lastaj tradukoj estis premiitaj de Esperanta Akademio. El liaj ceteraj tradukoj necesas menciigi "Taglibro de Vitaĝ-pedelo" (1921) kaj "Josefa" (1922) — ambaŭ el la dana de Bicher; "Karaktero" (1928) — el la holanda de Luiskus. Interalie, el la esperanta teksto de la lasta supremenciita traduko poste estis faritaj tradukoj en la finnan, ĉeĥan, italan kaj katalunan lingvojn. Estas menciindaj ankaŭ liaj naŭ leĝlernolibroj, plejparte por holandaj geetuloj kaj lia reverko de "Robinson Kruzo", por junuloj.

Sed plej famiĝis H. Bulthuis per siaj tri originalaj romanoj. La unua "Idoj de Orfeo" (1923) temas pri la strangaj aventuroj de tri ĝemeloj, kiuj post multaj konfuzoj fine trovas unu la alian. En 1926 ĝin sekvis dua naive simpla romano "Josef kaj Edzino de Potifar", kaj en 1928 romano "La Vila Mano", kie legantoj trovis bildojn el kamparana holanda vivo en la norda parto de Nederlando, kiun la aŭtoro intime konas kaj kies lokojn kaj homojn li priskribas ame.

Antaŭ la dua mondmilito aperis ankoraŭ unu romano de H. Bulthuis "Inferio" (1938), en kiu estis montrita kontrasto inter nia "Infera" mondo kaj feliĉa insulo de blinduloj.

Entute dum sia literatura agado la verkisto eldonigis ĉirkaŭ 40 librojn kaj broŝurojn, kiuj bone prezentas lian ekstaran rakontistan talenton. Ni esperas, ke fragmento el romano "La Vila Mano", kiun vi povas legi ĉi tie, helpos prezenti al vi la verkistan stilon de H. Bulthuis.

Hindrik Jan Bulthuis

(1865-1945)

La Vila Mano

(romanfragmento)

... Dirk estis en la traveturejo de Peĉjo, kie staris tri veturiloj kun ĉevaloj. Dirk tenis la kondukilojn de unu el la bestoj kaj pacience atendis la revenon de la farmistoj, sidante en la drinkeja ĉambro, vikle, laŭte babilante kiel laŭkutime pri ĉiaj temoj, sed precipe pri siaj aveno, tritiko, hordeo, pri ĉevaloj, aĉetitaj kaj aĉetotaj, pri bovinoj kaj iomete ankaŭ pri politiko.

De tempo al tempo ilian interparoladon interrompis laŭtega ridado, laŭtaj krivokoj, penetrantaj en la traveturejon, sed ili faris nenian efikon je la servisto, ĉar li ne aŭskultis; li eĉ ne aŭdis, ke Peĉjo kelkfoje brufapis la manplatojn, dum li deklamamis pecon de sia poemo. Dirk kiel kutime, refoje dronis en meditado, starante kun kurbiga dorso kaj pintigitaj lipoj kvazaŭ por fajfi, tamen li neniam fajfis, tiun arton li ne praktikis. Li praktikis nenian arton krom tiu de aerkastel-konstruado; li eĉ ne sciis legi, nek skribi. Li povis nur labori kaj ankaŭ ĉi tiun tagon li estis laborinta. Jam frue en la mateno li kaj Alino estis melkintaj la bovinojn, ili estis kune irintaj paŝtejon. Sed ŝi ne parolis kun li, nek atentis lin dum tiu promenado tien kaj returnen. Reveninte li unue estis nutrinta siajn kuniklojn, poste la porkojn kaj la ĉevalojn. Je la deka horo li devis iri kampon por elterigi saketon da terpomoj, kaj li estis farinta tion puŝante siajn manojn profunden en la teron sed samtempe li mem estis dronigante siajn pensojn en profundan abismon ĝis la saketo estis plenplena... Poste li estis puriginta la ĉevalejon... kaj jen li denove staras en tiu loko konstruante al si novajn aerkastelojn en kiuj li, kiel Alings, la riĉa terposedanto, ludis la plej gravan rolon. Li pensis: Se mi estus Alings, aŭ la filo de Alings, mi volus havi belan veturilejon kaj belajn veturilojn. Ĉiutage mi veturus urbon, tra la urbo, returnen al la vilaĝo kaj mi mem kondukus la ĉevalojn... Veturante preter homojn de mia vilaĝo, mi haltus kaj invitus ilin veturi kun mi vilaĝon. Ili akceptus kaj kune ni babilus pri ĉio, pri la granda farmodomo, pri miaj ĉevaloj... kunikloj ... pri... Li dronis pli profunden en sian meditado...

La dua aŭtoro, kun kies literatura agado ni volas konatigi vin, karaj legantoj, estas pola verkisto Jean Forge.

Jean Forge

estas pseŭdonimo de verkisto Fethike, poia filmreĝisoro. Li naskiĝis 26 feb. 1903 en Oppeln. Estinte politeknika studento li ankaŭ laboris en redaktejo de Danzig-a taga ĵurnalo. Iom poste en Berlin li laboris kiel asistanto de reĝisoro ĉe la fama Universum Film A.G. (UFA). De 1928 aperis liaj filmoj, inter ili la plej sukcesaj: "Transe de la strato" kaj "Vojaĝo de Panjo Krause en feliĉon" En 1934 J. Forge reĝisoris eĉ la E-lingvan filmon "Morgaŭ komenciĝos la vivo".

J. Forge esperantistiĝis en 1919, poste aktive partoprenis la polan E-movadon, komence de 1932 sukcese gvidis Cseh-metodajn kursojn en Svedlando.

Jam ekde la knabaj jaroj li provis verki: lia unua romano en la germana lingvo aperis kiam li estis nur 18-jara. Post la gimnaziaj studoj dum kelkaj jaroj li redaktis revuon "Esperanto Triumfonta".

J. Forge famiĝis kiel aŭtoro de originalaj E-romanoj. Lia unua romano "Abismoj" aperis en 1932. En la romano en originala formo kaj rakontmaniero li priskribis eventojn de ĉiutage vivo kaj profunde analizis homajn animkonfliktojn. La romanherooj en la unua persono rakontas la okazaĵojn, laŭvice alternante.

La dua romano "Saltego trans jarmiloj" estis skribita en sekva, 1924 jaro. Tio estis fantazia historio pri revojaĝo al la pasinto, al la tempo de Nerono.

Ankaŭ la tria verko "Mister Tot aĉetis mil okulojn" (1931) estas fantazia aventur-romano. La romanfiguroj ŝajnas nerealaj homoj, sed estuloj, kreitaj per la fantazio de eltrovema kaj observema aŭtoro-psikologiisto. Tamen absoluta arto de la karakterizado, pure literatura lingvo de la aŭtoro alportis grandan sukceson al la romano. Ĝi estis reeldonita en 1973 kaj tradukita en kelkajn naciajn lingvojn: pola, germana, sveda kaj aliaj.

J. Forge daŭris verki ankaŭ dum la tria literatura periodo, kiam aperis liaj humoraj primovadaj novelaroj "La verda raketo" (1961) kaj "Mia verda breviero" (1974), kies temoj estis prenitaj el la Esperantista vivo.

Sendube J. Forge estis ideoriĉa, sprita aŭtoro, ĉiuj liaj romanoj estis plezurigaj kaj atingis novajn eldonojn. Ĉi tie vi povas legi fragmenton el la unua romano de la verkisto "Abismoj".

Jean Forge

Abismoj

(romanfragmento)

Kie mi estas? Ha! En kafejo...

La orkestro ludas iun valson... la sonoj dancas tra la kafejo, dancas tra la vejnoj de la homoj, dancigas la sangon, klopodas krei sentojn voluptajn, volas ebriigi la aŭskultantojn...

Kion volas la fraŭlino apud mi? Mi devas demandi ŝin. Ŝi sidas apud mi ĉe la tablo. Antaŭ ŝi staras glaso da vino. De tempo al tempo ŝi trinkas malgrandan gluton. Kaj ŝiaj lipoj brilas ruĝe, soife...

La homoj sidas en longaj vicoj: sinjoroj, fraŭlinoj...

Nigre vestitaj sinjoroj kuras freneze tien kaj reen. Tiuj nigraj dupieduloj englutas monon, tre multe da mono... kaj kun kiaj strangaj indiferentaj mienoj ili tion faras... Ili skribas, notas ion en libretoj kaj ŝvebfingre balaas la monbiletojn en la poŝon... tute aŭtomate kiel maŝinoj! Kaj la homoj restas trankvilaj, malfermas al tiuj monbalaistoj siajn monujojn, permesas, ke la longaj malgrasaj ungegoj de tiuj nigruloj prenaĉas la monon senĝene... Mi devas protesti kontraŭ tia fia agado!


Ha, kion mi vidas! Estas vere amuza afero. La nigruloj alportas bonan vinon kaj ĉampanon al la pagemuloj kaj ankoraŭ aliajn multajn bonajn trinkaĵojn kaj manĝaĵojn... De kie ŝtelis tiuj ruzuloj tiajn bonaĵojn, kiujn ili vendas kontraŭ multaj, multaj monaj biletoj... aha, pro tio ili kuradas tiel freneze... certe ili timas, ke iu povus rimarki, ke ili ŝtelaĉis tiujn bonaĵojn... tiaj malsaĝuloj... ili eble kredas, ke la homoj ne havas okulojn, ke ili ne rimarkas ilian ŝtelistan agadon?... Sed de kie ili tiel rapide...

... La orkestro ludas.



W. J.

Sadretdinova Naila [Voroneĵ, Rusio]



Manoel Ramos Nogueira
[TORRES, Brazilo,]

La grandego de la maro estas
mia korpo.

La velŝipo kiu glitas suronde
estas mia animo.

La emocio estas la vento kiu
forpelas ĝin kaj la blua ĉielo
estas miaj okuloj kiuj vidas
ĉion.

Mi estas

poemo

Mi estas homo kiu kunportas la pasintecon ene de mia memoro.

Mi havas okulojn kiuj vidas longe, trans la horizonton.

Mi havas aŭdon kiu aŭdas la sonon ankoraŭ ne sonantan.

Mi povas senti la vivon de homo kiu ankoraŭ ne estas mi.

Mi povas vojiri sur vojoj perditaj en la tempo.

Mi povas plori de la cikatro doloroj kiuj malaperis; ami la virinon kiu neniam fordoniĝis.

Mi estas la espero kiu apartigas la revon el la realo.

Mi povas esti la ombro de la arboj kiuj ankoraŭ ne ĝermis: la buŝo kiu atendas amkison.

Mi estas la mallumo kiun la lumo ankoraŭ ne iluminis kaj estas la lumo kiun blindulo
ankoraŭ ne vidis.

Mi povas ridi, plori aŭ resti muta; esti malgranda kiel roso; granda kiel la mondo; esti
militisto preta por la batalo aŭ infano plena da ploraĉo, sed ruza.

Mi povas veti ĉion per unu nura ludrondo, nur por scii, ĉu la sorto estas kaŝita ludkarto.

Mi povas esti la vento, la muelejo, la tritiko kaj la pano.

Mi povas esti la vojaĝanto, la vojo kaj la soleco.

Mi povas esti la mateno kiu ne mateniĝis. La vespero kiu ne vesperiĝis aŭ la nokto, kiu
neniam noktiĝis.

Mi povas esti la piediranto kiu neniam paŝis; la odoro de parfumo kiu neniam odoris; la
paroloj kiujn la mondo neniam parolis; la beleco kiu neniam montriĝis; la frukto kiun
iu neniam provis; la maro kun la velŝipo neniam naviginta; la revo kiun la homaro
neniam revis.

Mi povas esti la amkanzono kiu neniam estis skribita aŭ kantita.

Mi nur ne povas esti la fonto de vivo, naskanta la vivon, kvazaŭ vivdaŭra akvofalo.



Sendis al la redakcio **Inga Johansson**, [Goteborg, Svedio]

Awat Mezori

(kurda poeto, loĝanta en Svedio, originale verkas en E-to)


Poemo

Iun vesperon mi aŭdis ploron. Ĝi venis de arbo en la arbaro.
Mi demandis: "Kial vi ploras?"
La arbo respondis: "Ĉu mi ne ploru?
Rigardu min! Mi estas nuda, miaj folioj estas for.
La birdoj ne volas trili ĉe mi."

Post momento mi aŭdis ridon.
Estis la tero, mi demandis: "Kial?"
La tero respondis: "Mi estas ĝoja,
neĝo kaj pluvo alvenas."

Tiam mi hejmeniris kaj demandis mian amatinon:
"Kiam ni ridu kaj ĝojiĝu?"
Ŝi respondis: "Kiam libereco krepuskos."

A-M 1991-10-17



Kononova Snejana [N.Omka, Rusio]



Santi Elena Bullo
[Mestre, Italio]

Venecio

Estas mia urbo-konko
El ŝtonoj kaj oro
Kiun ĉirkaŭbrakas
Kvieta verda akvo.
Kiam brilas la suno
Briliĝas la laguno
Per mikraj lumoj.
Sed kiam naskiĝas la luno
Ĉion mirinde ĝi kaŝas
Per blanklakta koloro.
Tiam al vi ŝajnas vivo
En senvorta revo.

2-6-2001

Santi Elena Bullo [MESTRE, Italio]

Leksina Ludmila

[Sudĵa, Rusio]

Besta alfabeto**A**

Aroman arbon amas abelo.
 Aroganta apro avidas avelon.
 Aglino angore adoras aeron.
 Akva anaso atakas anseron.
 Amuzas azeno asketan ardeon.
 Alko aneksas arbaran areon.

B

"Bonvenu!"
 Bizara bazaro...
 Birdoj butikas,
 butikas bufinoj.
 Brokantas brutaro.
 Blekas bovinoj.
 Brava buldogo-bubaĉo
 bojegas
 Bestoj balbutas
 blasfemas,
 bruegas...

Besta bazaro!
 Bizara bazaro!

C

Cerkopiteko
 certe ciferas
 ceterojn:
 cikadojn, cipselojn,
 cigninojn,
 cebojn, cedemajn cervinojn,
 cinocefalojn — cerberojn.

AMUZA GRAMATIKO**Perevalov Jurij** [Lesnoj, Rusio]

Jurij Perevalov kolektis la vortojn, kiuj diferencas unu de la alia nur per unu litero-vokalo. Por oni ne eraru kaj misuzu ilin, li elpensis ŝercajn komentariojn kaj ilustris la aferon per humuraj bildetoj. Ni planas daŭrigi lian serion en la sekva jaro.




La litero "A" en la vorto "Aranĝo" aspektas kiel la plej simpla konstruo: ĝia trabo estas albatata per najloj.



La litero "O" en la vorto "Oranĝo" similas teleron, sur kiu vin atendas tri bongustaj oranĝoj.



Sur la "trabo" de la litero "A" en la vorto "Ardo" estas facile pendigi kaldronetojn. La manĝaĵo kuirigas per varmega ardo.



En la literon "O" de la vorto "Ordo" oni povas facile meti tri lampojn - verdan, flavan kaj ruĝan. La ordo sur la ŝoseo estas merito de la signallampoj!



En la fenestreto de la litero "A" en la vorto "Arta" oni povas pendigi belan bildon, kiu estas vera arto!



La litero "O" en la vorto "Orta" similas brulantan ringon, en kiun orte saltas tigroj en cirko.



Sur la "trabo" de la litero "A" en la vorto "Avo" sidas avo. La plej bona loko por ripozo!



La litero "O" en la vorto "Ovo" estas ovo, kiun oni manĝas dum matenmanĝo.

William Thorne, [Londono, Britio]

Akuzativo indikas la celon!

Gramatikaj limerikoj

Adjektivo

Adjektivon ni tuj ekvidas
Per finaĵo "A" ĝi validas
Ĉu bela aŭ basa
Malgranda aŭ grasa
Ĝi tian aferon priskribas

Akuzativo

Kiam io fariĝas en io
Ricevanto ricevas la "N"-on.
Ne gravas la ordoj
De aliaj vortoj,
Akuzativo indikas la celon!

Adverbo

Rapide ni certe ekscias
Kiamaniero funkcias
"Amike parolas"
"Sincere ni volas"
E-sence ĉe l' fin' materias

Artikolo

Por rusoj komplikas parolo
Kun uzo de "la" - artikolo.
Sed sen tiu vort'
Ne klaras la sort'
Ĉu kapo situas sur (la) kolo?

Pronomoj

Se vi kaj mi edziĝos
Kontentaj do ni estos.
Se li kaj ŝi kverelos
La viv' de ili kraŝos.
Ni helpu ilin, je la paco,
Plejmulte ĝi valoros.

Sekrete mi diras al vi,
"Ŝi estas pli saĝa ol li".
Ni estas por ili
Ĉiam pretaj konsili
Sed ambaŭ ignoras je ĝi.

Gratulojn!


*Dum kvaz plenaj jaroj nia
fidela amiko, kunlaboranto
kaj entute bona homo
William Thorne
ĝojigas nin per siaj spzitaĵ
desegnaĵoj, aĵozismoj kaj
aliaj kontzibuaĵoj por
KOMENCANTO.*

*Kiam vi ricevos tiun kajejon,
kazaj legantoj, William
Thorne festos sian vican
naskiĝdaton.*

*81-an januaron zenkontos nia
bzita amiko, sed kun juneca
ĵetvozo kaj mizinda agemo li
daŭzigas multon ĵazi por la
sukceso de nia gazeto.*

*Ni gratulas vin, kaza Bill!
Restu por ankorau longa
tempo aktiva, enezgia, spzita.
Sanon al vi, bonhumoron por
multaj jaroj!*

*Amike viaj R. Jaĵasova,
V. Kudzjavcev kaj ĉiuj
legantoj de "K"!*



ŝerca foto donacita al "K"

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco {N.Neksin}

AFO[☹]RISMO[☺]J

Opinio pri burokratio

reguloj de la burokratia vivo estas same internaciaj kiel Esperanto

La leĝoj de
Siril Nortkot PARKINSON:

Kontaktoj kun burokratio similas al la fiŝkaptado en la loko, kie la fiŝoj mankas.

La kvanto de oficistoj kreskas sendepende de la kvanto de laboro.

La oficistoj kreas laboron unu por la alia.

La postenulo multnombrigas la subulojn, sed ne konkurentojn.

Rifuzo — la sola ĝojo en la griza vivo de burokrato.

La ŝtata aparato estas mirinda mekanismo, permesanta al 10 fari laboron de unu. {NN}

Mi kredas en nieeviteblan morton de ĉiuj teraj organismoj — sed ne la organizoj. {Stanislav Eji Lec}

Sen kapo povas esti la rajdanto, sed ne la ĉevalo. {Danil Rudij}

Persono, kiu scias "kiel" ĉiam trovos laboron, sed persono, kiu scias "kial" iĝos lia ĉefo. {Diana Rejvič}

Ju pli longa estas nomo de la posteno, des pli malgrava estas ĝia signifo. {Gorĝ Makgovern}

Zujeva Margarita

[Moskvo, Rusio]

Naturo kuracas, kuracisto helpas al resaniĝo.

{Hipokrato}

Makarenko Vladimir

[Tverj, Rusio]

Plenumanto de la malbona kanto ĉiam komencas aplaŭdi la unua.

{Bing Kcosbi}

Ne ĉiu vero estas beleco, sed ĉiu beleco estas vero.

{K. Stanislavsky}

Pri la homo eblas juĝi per tio, pri kio li ridas.

{Wilson Mizner}

Nosova Jekaterina

[Usołje-Sibirskoje, Rusio]

Vivo estas paradizo... por pekuloj.

*

Oni deziras vivi kiel ĉiuj, sed konscienco ne permesas tion.

Kolekti gregon el ŝafoj estas facile, sed malfacile estas kolekti gregon el katinuoj.

{Sergeo Kapica}

Juĝi pri la homo necesas kiel laŭ liaj amikoj, tiel same laŭ liaj malamikoj.

{Ĝozef Konrad}

Antaŭe aktorinoj penadis fariĝi kinosteloj, nun kinosteloj penadas fariĝi aktorinoj.

{Laŭrens Olivje}



Sulepov Vladimir [Verĥoturje, Rusio]

ANEKDOTO

Rudolf Zoldoš

[KANJIZA, Jugoslavio]

Kolektis el hungarlingva ĵurnalo kaj esperantigis

Policisto deziras legitimi unu viron, kiu estas ebria.

— Kial vi kuŝaĉas surstrate ebria?

— Ĉar mi perdis...

— Kion do vi perdis?

— Kion, kion... mian ekvilibron.

Makarenko Vladimir

[Tverj, Rusio]

Turisto en la afrika arbaro renkontas aborigenon, kiu senlace batas tamtamon.

— Kion vi faras? - demandas la turisto.

— Mi ne havas akvon dum kelkaj semajnoj.

— Ha, mi komprenas, — diras la turisto kun degna mieno. — Vi petegas la ĉielon pri pluvo!

— Absurdo! Mi simple vokas akvodukto-ripariston.

*

— Kelnero, ni celebras la 25-an datrevenon de nia kuna vivo. Kian vinon vi povas proponi por ni?

— Estas du variantoj: ĉu vi deziras festi aŭ vi volas forgesi?

Nosova Jekaterina

[Uŝolje-Sibirskoje, Rusio]

Fiŝkaptisto fanfaronas al la amiko:

— Hieraŭ mi kaptis fiŝon, jen ĝuste kiel mia brako...

— Ne mensogu. Tiaj harozaj fiŝoj ne ekzistas!

NN

— Mi havas du novaĵojn - bonan kaj malbonan.

— Diru dekomence la bonan.

— La bona novaĵo konsistas el tio, ke mi ne diros al vi la malbonan.

— Kaj la malbona?

— La malbona - ke mi ne diros la bonan.

*

Kiam mi estis ordinara fervojisto, mi pensis: kia stultulo estas nia staciestro. Poste mi mem iĝis la staciestro.

Puŝkarjov Valentin

[Ekaterinburg, Rusio]

En la rivero renkontiĝas du naĝantoj. Unu el ili al la dua:

— Ĉiuj ĉirkaŭe estas vestitaj en bankostumoj, sed sur vi mi vidas ĉapon, kravaton kaj kostumon...

— Ĉiuj ĉirkaŭe baniĝas kaj naĝas, sed mi dronas!

Zujeva Margarita

[Moskvo, Rusio]

Kolorigisto petas salajron.

— Aŭskultu, sinjoro! Sed vi ja kolorigis bariilon nur de unu el la flankoj!

— Kion vi volas? En la kontrakto estas skribita: "...la kliento de unu flanko, la plenumanto - de la alia flanko..."

*

— En miaj tempoj fraŭlinoj ankoraŭ scipovis ruĝiĝi pro la hontemo, - diras avo al sia nepino.

— Mi do imagas, *kion* vi al ili diris!

*

Kuracisto:

— Jes, malfermu la buŝon. Pli vaste! Ankoraŭ pli vaste!


— Sinjoro kuracisto, ĉu vi volas tien rigardi aŭ eniri?



Ŝulepov Aleksandr, [Verĥoturje, Rusio]


Al ĉiu besto plaĉas sia nesto

Bonvolu trovi en la literkaoso nomojn de la bestoj, hejmaj kaj sovaĝaj. Ĉiu litero uzatas nur unufoje en unu vorto. La vortoj etendiĝas ajn-direkte. Vidu ekzemplon [pri cervo].



Respondoj al la vortenigmo pri “Legomo, frukto kaj bero” el “K”-7/2001:
Terpomo, ajlo, brasiko, kukumo, bero, pizo, piro, oranĝo, ĉerizo,
citrono, cepo, nukso.

Konjektu, kiaj estas la objektoj?



Yonier
Cables
Solis
[Holguin, Kubo]

En la bildo estas kaŝitaj ses diversaj objektoj. Bonvolu trovi kaj nomi la objektojn. Ili estas tute diversaj, el malsamaj temoj. Ni atendas viajn respondojn kun veraj solvoj.



Bill Thorne
RIMARO

ANO
aeroplano
ano
arkano
banano
celofano
cigano
ĉampano
ĉarlatano
ĉikano
dekano
divano
donjuano
ekrano
fazano
filigrano
flano
fontano
glano
grano
ĝentlemano
huligano
infano
kabano
kalkano
kankano
kapitano
klano
Korano
krano
lano
mano
pano
romano
turbano

REZULTOJ KAJ PLANOJ

Karaj legantoj! Tiu ĉi kajero de "Komencanto" aperas en la lastaj tagoj de jam foriranta jaro. Ĉe la fino de jaro oni kutime kalkulas rezultojn. Do, rerigardante faritan dum la jaro de kritika distanco, ni povas vidi, ke eble "ne ĉiu nia pafo perfekte trafis", sed tamen kelkajn sukcesojn ni havas.

Tio, kion ni vere penadis fari — ni celis kiel eble stimuli novajn esperantistojn al progreso en Esperanto, kiom eble montri, ke la lingvo estas taŭga kaj por poezio, kaj por diversgenraj originalaj kaj tardukitaj verkoj, por diversspecaj humuraĵoj — kaj ĉiu komencanto jam nun povas apliki la lingvon en tiuj sferoj de kreado. Kun kontento ni povas konstati, ke sukcesis atingi tiun ceion: dum la 2001-a jaro en "K" aperis kun siaj verkoj 32 aŭtoroj el 11 diversaj landoj. Por multaj el ili tio estis la unua praktika uzado de la lingvo kaj la unua plezuro vidi sian nomon sur la paĝoj de revuo.

Estas aparta ĝojo mencii, ke surprize multaj desegnistoj kontribuis por "K" — dum 2001 entute 16 personoj ĝojigis nin per siaj bildoj. Ili estas jam konataj Bill Thorne, Kononova Sneĵana, Vinnikova Nina, Perevalov Jurij, Sadretdinova Naila kaj ĉirkaŭ dek novaj aŭtoroj.

Inter sukcesoj estas ankaŭ kreskinta je 21%, kompare kun la 2000-a jaro, kvanto de abonantoj. Al nia areo aldoniĝis Finnlando, Japanio kaj eĉ Islando!

Se taksu la enhavon de la gazeto, el la reĥoj de niaj legantoj ni vidas, ke bonan klerigan rolon plenumas la konstanta rubriko pri historio de E-literaturo. En la kadroj de tiu-ĉi rubriko aperis rakontoj pri 19 famaj ver-

kistoj de la dua periodo. La historio de E-literaturo enhavas plurajn nomojn de aŭtoroj kaj ni planas daŭrigi tiun rubrikon en 2002 jaro.

Sufiĉan atenton meritis temo de popolojaj fabeloj kaj ni ricevis interesajn proponojn de la legantoj disvastigi tiun-ĉi temon kaj estonte lanĉi rubrikon, kiu prezentos nacian folkloron, kiu povas esti interesa por alilandanoj kaj kie oni povus interŝanĝi per tradicioj, lokaj moroj kaj eĉ naciaj receptoj, kostumoj, proverboj ks.

Krom tiuj tradiciaj rubrikoj, en la 2001-a jaro en "K" aperis la nova "Kiel tio komenciĝis" — pri komencantaj periodoj de niaj eminentuloj. Ĝi eĉ neatendite por ni elvokis grandan intereson kaj estos nepre daŭrigata en 2002.

Estas valore, ke nia gazeto estas ne nur serioza legoperiodaĵo, sed ĝi havas ankaŭ sufiĉan spacon por malgrandaj pecoj de humuro. Jam tradiciaj humor-paĝoj de "K" gajnis grandan simpatian de la legantoj kaj certe havas daŭron sekvontjare, ĉar bona rido helpas kunigi la homojn kaj plisaniĝi la mondon.

De multaj legantoj sekvis propono refunkciigi la gramatikan rubrikon. Certe la lingva lernado neniam finiĝas. Do ni penos en "K" — 2002 fari la gramatikajn paĝojn, kiuj helpas al ni plibonigi nian lingvoscion. Ni jam komencis realigi tiun planon jam en tiu ĉi kajero.

Do, dum la jaro ni vere klopodis fari la gazeton varian kaj interesan, kies en-

havo ne nur instigas al la legado, sed ankaŭ puŝos al kreado. Kaj unu el la plej gravaj faktoj estas, ke "Komencanto" estas rezulto de niaj kunaj streĉoj, ĉar ni faris ĝin, karaj legantoj, kune kun vi, ĉiuj partoprenis kaj kontribuis diversmaniere. Ni pensas, ke ĉiuj ni sentis sin portempe unuigitaj per tia bona, kuna laboro.


Por la redakcio ĉiu numero estis kvazaŭ vojaĝo laŭ malmulte konata lando, kiam je ĉiu paŝo oni renkontas multe da nova, neatendita kaj donanta materialon por pripensado. Sed kio povas esti pli bona, ol malfermi ion novan kaj per tiu ĉi malfermo pliriĉigi mem kaj pliriĉigi la homan percepton de multaj aliaj.

Ni dankas ĉiujn, kiuj subtenis nian ideon kaj reĥis per iu ajn kontribuo. Aparte ni dankas niajn afablajn kaj helpopretajn legantojn: Bill Thorne, Ginette Martin, Margarita Zujeva, Santi Elena Bullo, Manoel Ramos Mogueira.

Nia redakcio restas esperoplena, ke sekvontjare "Komencanto" daŭre evoluos, nia rondo kreskos kaj ni povos fari kune la revuon pli utila kaj interesa.

Karaj legantoj! Ni deziras por ĉiuj feliĉajn festojn kaj sukcesan, fruktodonan 2002 jaron!

La redakcio



Al atingoj en la nova jaro!

Perevalov Jurij, [Lesnoj, Rusio]

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.


f-ino *Roya Purfarhadlu*
20 ja., kor. tutmonde
No:54, Kh:616 Shargi,
Kh: Tirandaz, =20
Falake sevvom
Tehran Pars, IR-1555747441
Tehran
Irano

Masayuki Saionji
Serĉas verdajn florojn
sur lumbildoj aŭ en
fotolibroj. Responde
al informoj mi sendos
verdajn florojn ja-
panajn.
<saionji@yumsiho.co.jp>

Puŝkarjov Valentin
Emerito, deziras kore-
spondi tutmonde kun di-
versaĝuloj pri ĉiuj temoj
Posadskaja, 44-3-62
Ekaterinburg,
RU-620086
Rusio

f-ino *Surur H.Tehrani*
36 ja., kor. tutmonde
No:123, kh: Hengam,
Resalat,
IR-16816
Tehran
Irano

f-ino *Jana Jezkova*
17 ja., kun junuloj pri
sporto, dancoj, muziko
CZ-675
21 PRIBYSLAVICE
ĉ. 175
Ĉeĥio



Ŝulepov Vladimir, [Verhoturje, Rusio]

s-ro *Tatet Guy*
Anoj de nia klubo dez. kor.
tutmonde pri diversaj temoj
Av. St. Gilbert, 2
Hameau de Deffend,
FR-03110
St. Didier la Foret
Francio

s-ro *Sergeo Pabomov*
Karaj gesamideanoj!
Bonvolu sendi al
mi por kolekto la plej
ĉipajn monbiletojn kaj
monerojn, jam ne
bezonatajn ekde
2002 en Eŭropo.
Dankon!

Pk 1392
Kirov,
RU-610904,
Rusio

s-ino *Silvia E.
Rottenberg,*
1941, reciprokaj vizitoj.
Av. Congreso 2973,
AR-1428
Buenos Aires
Argentino

KOMENCANTO

2002

16 paĝoj
kolora kovrilo
famaj esperantistoj
historio de E-literaturo
gramatiko serioze kaj ŝerce
amuzaj rakontoj
proverboj, aforismoj
anekdotoj
adresoj
multaj multaj bildoj

s-ro *Henribill Junqueira*
15 ja., korespondi kun
gejunuloj, kol. telefonkartojn
Av. Anchieta 490-32
Centro.
BR-11660-010
Caraguatuba
Brazilo

s-ino *Erika Beier*
internacia amika
korespondado
Ramseuerstr., 70/11-10,
AT-4020
LINZ,
Ober Osterreich,
Aŭstrio

s-ro *George W. Partlow*
informado kaj aliaj
temoj
P.O.Box 240557
Douglas AK 99624,
Juneau
USA

Por aboni "K"-n kontaktu vian landan peranton

UEA-konto "VKUD-A"

oblas abonpagoj rekte al la redakcio per monbiletoj aŭ IRK — kondiĉoj sur la paĝo 2

